

Edgar Yipsel Harburg,

Trans ĉielarko

tradukita de Pejno Simono

Ie - trans ĉielarko
super ni,
ŝvebas land' onidira
laŭ iu poezi'.

Ie - trans ĉielarko
kisas sun',
revoj iam riskitaj
iĝas por ni plenum'.

Al stelo iam preĝos mi
kaj noktaj nuboj tage tuj disiĝos,
ĉagrenoj suĉbombonos for,
jen super firstoj mia sor',
nu tion vi vidos.

Ie - trans ĉielarko
cerule'
flugas arkon ĉielen,
ve, kial mi, mi ne?

*Traduko de la Angla poemo "Somewhere over the Rainbow" de EDGAR YIPSEL HARBURG (civila nomo: Isidore Hochberg, *1896-04-08 – †1981-03-05) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-979-1976 (2014-03-14 17:22:16)

La teksto de tiu ĉi traduko troviĝas en http://wayback.archive.org/web/2005130091250/http://ourworld.compuserve.com/Homepages/profcon/e_ciel.htm.